


Vendrede, la 20an de julio, dum la mateno estis alia ekskurso, ĉi-foje al Oviedo, la Asturia ĉef-urbo. Unue la esperantistoj vizitis, ekstere de la urbo, la preromanikajn artajn kaj historiajn monumentojn Sankta Maria de Naranko (jaroj 824a-850a) kaj la preĝejon de sama epoko Sankta Mikaelo de Lillo, ambaŭ konstruaĵoj sur la deklivo de monto Naranko. Post tiu vizitado al la monumentoj, la kongresanoj revenis al la urbo kaj estis akceptitaj en la Universitato de Oviedo, kie la **HEF**-Prezidantino Urueña, Profesorino pri Internacia Juro en la Universitato de Valladolido, prelegis pri la temo “Esperanto kaj la Europaj Internaciaj Organismoj”, tre dokumentita prelego krome interesa kaj aktuala por la esperantistoj, kiun ŝi tre majstre kaj elokvente prezentis. Post tiu akademia akto, akceptis tie la gekongresanojn la Moŝta Rektoro de la Universitato de Oviedo S-ro Teodoro López Cuesta, kiu salutis la ilim, kiujn li difinis kiel “reprezentantoj de praktika viva kulturo”, kaj bedaŭris ne povi, pro profesiaj devoj, akompani ilin longan tempon….

Post tiu prelego, la Prezidantino kaj kelkaj **HEF**-estraranoj estis tre amike akceptitaj de la Urbestro de Oviedo en la Urbodomo. Paralele al tiu vizito, la gekongresanoj promenis tra la urbo admirante la vidindaĵojn de Oviedo, precipe la katedralon.

Vespere de tiu tago, denove en la kongresejo en Gijón, okazis la Ĝenerala Asembleo de **Hispana Esperanto-Federacio,** kiun prezidis S-ino Urueña. La Sekretario S-ro Hernández, post la legado de la akton de la antaŭ Kongreso en Leon, raportis pri la agado de la lasta periodo kaj prezentis la financan situacion de **HEF**. Prezentis raporton ankaŭ kelkaj sekcioj de la Federacio. Post arde dabati la solvon de diversaj problemoj, oni aprobis jenajn du rezoluciojn de la Kongreso: Unua: Mendi al la Ministroj pri Kulturo kaj Edukado la enkondukon de la lernigo de Esperanto en la programojn de la Baza kaj Meza Instruado. La aprobo kaj sendo de tia oficiala peto estas kvazaŭ rita programero de ĉiu kongreso de Esperanto, kiun oni faras –senutile– de antaŭ multaj jaroj. La dua rezolucio estis mendi al la Asturia Ŝparkaso la finacadon de la konferenco de la **HEF**-Prezidantino. Fine de tiu ordinara asembleo, samideano Casquero proponis Madridon kiel kongresurbo por la sekva jaro, kio estis aprobita de la ĉeestantaro.

Tuj sekve, kaj en la sama loko, okazis alia Asembleo, ĉi-foje Eksterodinara, de tiu Federacio por pridiskuti kaj aprobi la ŝanĝon de iuj statutaj artikoloj de la asocio.

La lasta programero de tiu tago okazis, nokte, en la restoracio “Bella Vista” (Bona Vidaĵo), la sama loko kie antaŭ kelkajn tagojn okazis la Interkona Vespero. Estis la Oficiala Bankedo de la Kongreso, kiu okazis en gaja kaj bonhumora etoso.

Dum la tagoj 18a, 19a kaj 20a funkciis en la kongresejo poŝt-afrankejo kun speciala afrankilo de la Kongreso. Krome, dum la tuta daŭro de la Kongreso estis en la kongresejo telefonaj budoj speciale dediĉitaj al la servo de la kongresanoj. Ankaŭ la libro-servo funkciis en la kongresejo dum ĉiuj kongrestagoj